

37^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

37° CONGRESO ESPAÑOL
DE ESPERANTO

37° CONGRES ESPANYOL
D'ESPERANTO

37° CONGRESO HESPAÑOL
DE ESPERANTO

ESPAÑAKO 37.
ESPERANTO BATZARREA

SABADELL
20-24 JULIO
1977



CENTENARI
SABADELL CIUTAT



BOLETÍN

DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

Nº 220 - MARZO-ABRIL, 1977

Directora: Doña Carmen Payá Mira

Dirección y Administración: Oficina Central - Rodríguez San Pedro, nº 13,
3º nº 7 - Telf. (91) 446 80 79 - MADRID - 15.

Redactor Jefe: Don Salvador Aragay Galvany - Bassegoda, 40
Telf. (93) 240 14 28 - BARCELONA - 14.

Comité de Redacción: D. Llibert Puig, D. Giordano Moya, D. V. Her-
nández Llusera, D. Gabriel Mora y Arana,
D. Pedro Nuez, D. Luis de Yzaguirre, D. Rafael
Herrero.

ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Centra Oficejo:

Str. Rodríguez San Pedro, 13-3º, 7
Teléfono (91) 446 80 79

MADRID-15

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19 - 7º

MADRID-16

Sekretario:

S-ro José Mª González Aboín
Centra Oficejo

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2 - 8º

MADRID-20

H.E.F.-Ĉekkonto: N° 8.362-271

Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54

MADRID-6

Libroservo de H.E.F.:

S-ro Félix Gómez Martín
Centra Oficejo

Informa-servo de H.E.F.:

Centra Oficejo

Eldona Fako:

F-ino Inés Gastón Burillo
Pº Marina Moreno, 35 - 4º

ZARAGOZA

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinionon de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankau ne reprezentas la opinionon de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

NUESTRA PORTADA

El cartel del Congreso, según el grafista, significa:

El apretón de manos, el símbolo de amistad y solidaridad del Esperanto; el edificio de la Biblioteca con la torre del observatorio astronómico, la representación gráfica de la cultura local; las barras verdes, que la ciudad durante el Congreso será también en parte esperantista; el título del Congreso en todas las lenguas nacionales, el respeto de los esperantistas por todas las lenguas vernáculas y las culturas que representan, y el símbolo oficial de la celebración del Centenario de Sabadell como Ciudad, la adhesión de los esperantistas a tan magno acontecimiento, lo que repercutirá a favor de nuestro Congreso.

SABADELL

Historia fono. La urbo situas en vasta valo nomita "Vallés". Eta rivero "Ripoll" fluas tra ĉi valo ĉe ĝia norda-orienta parto.

La historia fonda de "Sabadell" ne diferencas de la aliaj urboj "Terrassa" kaj "Granollers" starigitaj en la sama valo, ĉar la unuaj vilaĝetoj disvolviĝis apud bazaroj dum la antaŭromana kaj Romana epokoj apud la vojo "Pretorejo"; ĉi tiu vojo kunligis Kadizon kun Romo.

La nuna urbo "Sabadell" devenas de la Romana aŭ antaŭromana vilaĝo "Arrahona". Tiu ĉi tezo estis konfirmata en la jaro 1852 danke al la eltrovo de la fama "Vaso Apolinar", en la italaj naĝejoj nomitaj "Vicarrello".

Dum la unuaj jaroj de la dua jarmilo, aperis la unua vilaĝeto, el kiu devenas la nuna Sabadell. Ĝi organiziĝis en la ĉirkaŭaĵoj de bazaro, kaj ĝia aktiveco estis esence agrikultura kaj komerca.

Dume "Arrahona" konservis la lokon de la kastelo kaj la posedaĵojn de la antikvaj Romanaj konstruaĵoj kaj diversajn kampodomojn, Sabadell, en la alia flanko de la rivero "Ripoll", pli kaj pli firmiĝis kiel sendependa vilaĝo, kaj en la jaro 1233, oni jam mencias la "Vila de Sabadell" kun propra personeco, kvankam dum kelkaj jarcentoj ankoraŭ oni nomis ĝin, ĉiam kun la aldono de la vorto: "olin (en alia tempo) del terme i castell de Arrahona".

Dum multaj jaroj la sabadellanoj okupiĝis pri lina kaj kanaba kulturadoj kaj ŝpina kaj teksa laboroj. Samtempe aperis la privataj tekstilaj industrioj.

En la 16-a jarcento, liberigita de la kastelo kaj kunigita al la reĝa krono, la urbeto Sabadell konstruas sian novan preĝejon sur la antikva preĝejo "La Savanto", firmigas sian politikan karakteron kaj organizas la unuajn tekstilajn industriojn.

Je la jaro 1877, oni deklaris Sabadellon urbo, pro la granda kreskado de ĝia loĝantaro, danke al la tre aktiva teksindustrio. Tio altiris al la urbo grandan amason da familioj el la ceteraj katalunaj provincoj kaj el aliaj hispanaj regionoj.

Sabadell estas eminente tre socia kaj demokrata urbo.

Pro ĝia tradicio, ĉiam ekzistis vera konkordo inter la aŭtoritatoj kaj loĝantaro, entreprenaj estroj kaj laboristoj; plie, ĝi posedas multajn instituciojn, kiuj estas malfermitaj al ĉiuj novaj iniciativoj. Pro tio, kiam la sportaj ĵurnalistoj de Hispanujo kunvenintaj en asembleo akordis proklami kaj distingi Sabadellon "GVIDA URBO DE LA HISPANA SPORTO" nur ili kaptis la publikan senton, kiu dum pli ol duonjarcento estis vera realaĵo.

Sabadell estas unu el la unuaj urboj de Hispanujo, kiu ekpraktikis la ekskursadon, naĝadon, atletismon kaj aliajn sportojn. Jam de longe, la gejunuloj taksis tre bone la altan valoron de la sporta praktikado kaj multfoje, ili atingis internacian sukceson. Ekzemple, en la atletisma lasta ĉampioneco pri "Kampkurado" de la Nacioj, okazinta en Dusseldorf dum la pasinta monato marto, la sabadellano Karmena Valero estis la venkinto je 5.100 metra distanco, starigante la mirindan tempon da 17 minutoj kaj 26 sekundoj.

Oni povus multon diri pri aliaj aktivecoj de la sabadellanoj: arto, scienco, financo, kulturo; tamen, momente, ne eblas al ni dediĉi plian spacon. Ni esperas, ke en alia bulteno, oni publikigos pliajn informojn pri Sabadell kaj sabadellanoj. Ni deziras reliefigi nur, ke certe, vi leganto, ĝuos kaj ĝojos se vi ĉeestas la venontan 37-an Hispanan Kongreson de Esperanto en Sabadell, okazonta de la tago 20-a ĝis 24-a de julio, ĉar aŭtoritatoj, laboristoj, sciencistoj kaj ĉiuj sabadellanoj akceptos vin kore, sincere kaj samideane.

S. Aragay

REMOMORANTE LA DEK-KVINAN DE DECEMBRO

G. Moya.

Ni, esperantistoj, ĉiujare, je la dato 15-a de decembro, rememoras la naskiĝon de Zamenhof. Nia rememorado preskaŭ ĉiam konsistas en altiĝi lin ĝis genio de la homaro. Eble, oni povas demandi sin, se tiu altiĝo de lia personeco, lin konsiderante kiel genion, malproksime de ia ajn komparado de ni kun li, efektive estas pozitiva sinteno. Se el tiuj rememoroj rezultus vigla agado, tio estus io pozitiva; sed la nura omaĝo por poste resti en la meniofarado aŭ ne multe pli, estas faktoro, kiu povas nur konduki nin al la stagno. Tio, kion ni devas fari, estas, krom omaĝi la majstron, sekvi lin en lia agado. Kvankam ni ne estas kapablaj fari tion el la lingvistika flanko, nek ankaŭ el la verkista, tamen ni povas sekvi lian agadon en io, kion iu ajn el ni povas atingi, estas la forto de la volo.

Zamenhof en plena juneco kreis la lingvon; lia posta strebado estis por ĝin disvastigi, kaj en tio estas io, kiun ni povas kaj eĉ devas sekvi.

Ni povas kompreni la volon de Zamenhof vidante lin juna, tuj post la edziĝo, sen iu ajn kapitalo kaj kun la malmulta mona helpo de lia bopatro por presi la unuan libron. Per kelkaj anoncoj en periodaĵoj atingis interesatojn. Multnombra korespondado kaj kelkaj kunlaborantoj. En tiu momento naskiĝis la esperantista movado

Kelkfoje, ni supozas, ke siatempe li renkontis pli favoran opinionon ol la nunan kaj tio permesis al li la sukceson. Se nuntempe ni renkontas indiferecon, li tiam ricevis pli da moko ol aproboj. Siatempe la ĝenerala opinio estis pli malfavora ol nuntempe. Tio, kion havis Zamenhof estis fera volo, kiun donis al li la lukto por la mondpaco per kio la idiomo Esperanto nur devus esti ilo aŭ rimedo. Tia fera volo estas tio, kio precipe mankas al ni. Se ĉiu el ni konkerus tiom da adeptoj kiel li, post du aŭ tri jardekoj nia lingvo estus io ĝenerala kaj komuna. Ni, por ne ĝeni kiun ajn, silentas kontraŭ la milito. Ni kredas, ke la agado kontraŭ la milito ĝenos multajn personojn kaj interezojn; ke tio kompromitos nin; kaj de la lukto kontraŭ la milito nur restas platona deziro aŭ revo.

Bona estas la deziro por la paco, sed se tiu revo ne estas akompanata de la volo por agado el la revoj, nur restas revoj. La pacifismo ne povas ŝajni malkuraĝeco, nek nia movado, destinita de Zamenhof por unuigi la mondon en unu sola ronda familio, povas ŝajni iu ajn tempopasigilo. Tio, kion diras la Espero, signifas krei movan civilizacion; kaj tio nur realiĝos per forta volo de la plejmulto el la homoj. Se Zamenhof atingis milojn da adeptoj; miloj da adeptoj po miloj de aktualaj esperantistoj faros milionojn, kaj por tion fari, ni ne havas alian forton ol nian volon. Ni ne


posedas grandajn kapitalojn, ni ne estas bankieroj nek posedas internaciajn entreprenojn. Ni ne havas armilojn nek militistarojn, kaj se ilin ni havus, tio ne taŭgus por nia agado. Oni aŭdas nin, sed nin ne aŭskultas en niaj petoj al la registaroj por ke ili oficialigu Esperanton. Ili ne respondas ne, sed ne agas jes; plej urĝaj aferoj ĝenas ilin. Kiam Esperanto fakte estos disvastigita kun forta premanta opinio, tiam niaj petoj plenumiĝos. Dum ni estos malmultaj milduloj, ni ne atingos la donacon, kiun fine oni devas gajni.

La mondo estas tute plena de partikularaj interezoj, kaj efektive la lukto inter alfrontantaj interezoj estas la nevidebla kialo de la milito. Se la milito ofte maskas sin per idealoj, estas pro tio mem, ke la homoj volonte ne riskas sian vivon por aliulaj interezoj. La indifereco por la agado de la paco de la supro, la mezo kaj la malsupro, estas tio, kio baras nian sukceson por atingi movadon kapabla enkonduki la pacon en la mondon.

Zamenhof luktis kontraŭ la moko. Ni devas lukti kontraŭ la indifereco, kaj por tiu luktado, ni ne havas alian rimedon ol la nudan volon. Sed firma volo kiel la fera de Zamenhof, nur povas eliri el ni, se ni, kiel Zamenhof, faras tion por granda kaŭzo, kiel estas alvenigi novan pacan civilizacion. Paca mondo ankoraŭ estas aĵo neniam vidata. Ni estu precize la pacbatalantoj por enkonduki ĝin.

FUNDACION _____

_____ "ESPERANTO" _____



DON QUIJOTE SURVOJE

En la lasta kunsido de la Patronaro de "Fundación ESPERANTO" okazinta la 27-an de januaro 1977, oni speciale studis la proponojn de la Hispana Esperanta Junulara Sekcio (HEJS) eldoni la romanon "Don Quijote de la Mancha" en la Esperanta traduko de Fernando de Diego kaj malfermi konton, kiun HEJS men komencis per donaco de 2.000 pesetoj por kolekti fonduson por helpo de la eldonkostoj.

La Patronaro unuanime akceptis la sugestojn de HEJS kaj laŭ propono de Dro. Sancho Izquierdo, la "Fundación ESPERANTO" malfermas la diritan konton per la mono destinita por siaj ĉijaraj literaturaj konkursoj.

"Don Quijote de la Mancha", kiu estas jam kompostata, aperos proksimume en junio ĉijara en formato 17,5 x 25, ilustrita, "Milskin" —bindita kun 672 paĝoj kaj ĝia prezo estos 1.800 pesetoj por ĉiu ekzemplero. Por antaŭmendoj kun samtempa antaŭpagoj, ricevitaj ĝis la 30-a de majo, la dirita prezo reduktiĝas al 1.000 pesetoj

Mendojn kun pagoj, —kaj donacojn— oni sendu al Inés Gastón, P^o Marina Moreno, 35, 4^o dcha. ZARAGOZA-1 Hispanujo.

DONACOJ

Premio "Sancho Rebullida"	6.000,— pesetoj
Premio "Francisco Máñez"	2.000,— pesetoj
Hispana Esperanta Junulara Sekcio (HEJS)	2.000,— pesetoj
Manuel Manteca López, Santa Cruz de Tenerife.	15.000,— pesetoj
Pedro Nuez, Barcelona	1.000,— pesetoj
Miguel Sancho Izquierdo, Zaragoza.	1.000,— pesetoj
Salomé Sancho Rebullida, Zaragoza	1.000,— pesetoj
M ^a Pilar Sancho Rebullida, Zaragoza.	1.000,— pesetoj
Esperanto-Grupo Moyá.	2.000,— pesetoj
Santiago Arizmendi, Eibar (Guipúzcoa)	300,— pesetoj
Grupo de Esperanto, Alicante	2.500,— pesetoj
Hispana Turisma Esperanta Sekcio (HTES)	2.000,— pesetoj
Grupo Esperantista, Bilbao	2.000,— pesetoj
Grupo Esperantista, Valladolid.	2.000,— pesetoj
"Frateco" Esperanta Societo, Zaragoza	2.000,— pesetoj
Jacinto Jiménez Jerez (Aranjuez) Madrid	1.000,— pesetoj
E. grupo de Callosa de Segura (Alicante)	1.000,— pesetoj
	<u>43.800,— pesetoj</u>

Zaragoza la 25 an de Aprilo 1977

NIAJ GRUPOJ

BARCELONO

“Stelo de Paco”: Okaze de la 100-a datreveno de la fondiĝo de la Kooperativo de Manteksistoj, nia grupo okazigis la jenan aranĝon: Dimanĉe la 9-an de januaro je la 12-a horo, prelego de s-ro Llibert Puig en kataluna lingvo pri la temo “Una Revolució Lingüística” (LINGVA REVOLUCIO), dum kiu, la preleganto prezentis la problemojn ĉe la internaciaj lingvaj rilatoj kaj ĝia nuna solvo pere de nia I.L.

“E-fako UNESKO”: Dum la 18-a de Decembro estis organizita vespera kunveno kun la celo honori D-ron L.L. Zamenhof kaj festi la TAGON de la E-libro kaj la 30-jaran datrevenon de la fondiĝo de UNESKO. Pli ol 60 geesperantistoj ĉeestis. Inter la aranĝoj organizitaj, meritas esti menciitaj la jenaj: Salutvortoj kaj informado pri UNESKO far s-ro S. Aragay; prelego de s-ro P. Nuez pri D-ro L.L. Zamenhof titolita “NUR HOMO”; projekcio de filmo pri la 28-a IFEF-Kongreso en Skelleftea (Svedujo) de s-ro R. Devis; ekspozicio pri Esperanto-libroj zorgata de s-ro M. Vilagrán.

La tagon 15-an de januaro, kunvenis en nia sidejo, reprezentantoj de la E-grupoj de Barcelono kun la celo reorganizi E-Asocion por la urbo Barcelono, memstaran kaj sendependan. Oni aprobis ĝian statuton kaj ĝian nomon, kiu estos “Barcelona Esperanto-Centro”.

Monistrol de Montserrat: Grupoj de gejunuloj el Barcelono kaj Sabadell kunvenis la 8-an kaj 9-an de januaro en la “Junulara Restadejo” kun la celo reorganizi H.E.J.S. Post 4 horoj da serioza diskutado kaj laborado, oni fiksas la unuajn ŝtonojn de la junulara sekcio de HEF. Prezidis la kunvenojn ia nova ĵus elektita prezidanto s-ro Ludoviko de Yzaguirre.

EL FERROL

Nova Esperanto-Grupo naskiĝis en Hispanujo. En la pentrinda galega urbo El Ferrol, dum la pasintjara Hispana Kongreso de Esperanto, la ferrolaj gejunuloj kunvenis kun samideano Petro Nuez el Barcelono, kiu instigis ilin al starigo de Esperanta Klubo. Aro da bonvolemaj gejunuloj bone konsciiĝis pri tia bezono, kaj kun kuraĝiga apogo kaj granda entuziasmo, tamen sen mono, ili komencis labori por la Internacia Lingvo.

Ja dum la unuaj tagoj de monato oktobro, dum la daŭro de unu tuta semajno, ĉiutage, akurĉite je la 13-a horo, estis prezentitaj pere de la radiofonia populara programo "ĈIO JE LA UNUA HORO" de Radio Ferrol la voĉoj de niaj gejunuloj, en viglaj, interesaj kaj informaj intervjuoj. Ĉe la antaŭlasta intervjuo radiodisendo ankaŭ s-ro Francisko Lledó estis pridemandita per grava interparolo.

Post demarŝoj, kunvenoj, streĉo, penado kaj pretigado de la ejo, finfine je la monato novembro estis inaŭgurita la Esperantista Grupo "VERDA STELO", kies malfermon partoprenis ankaŭ samideanaro el Vigo. Multon helpis la sperto jaj konsiloj de s-ano Bueno el Vigo, kiu ofte kun edzino vizitadis la ferrolajn gejunulojn por kuraĝigi ilin al starigo de la nova ejo.

Ekde la inaŭguro, ĉiutage okazas kursoj de Esperanto matene, vespere kaj nokte. Nuntempe kaj periode estas distribuataj afiŝoj anoncantaj la senpagajn kursojn, kiuj estas sub la aŭspicio de la Kultura Fakto de la Ferrola Urbodomo. (1)

La 2-an de januaro aperis en la ĵurnalo "Ferrol Diario" artikolo pri Esperanto. La Grupa Estraro estas la jena:

Prezidantino: Angela Núñez Piñon
Kasistino: Karmena Pita Fernández
Sekretario: Emanuelo Doval Alvarez

La luprezto de la ejo estas iom kosta, kio superas la kasan eblecon de la tieaj junaj esperantistoj, kiuj devas multe penadi. Ni petas ĉies helpon: fariĝu membro-subtenanto.

Sendu esperantaĵojn, afiŝojn, esperantajn librojn kaj gazetojn por starigi la grupan bibliotekon, al:

Esperanto-Grupo "VERDA STELO"
Pintor Imeldo Corral, 14
EL FERROL (Coruña)

(1) Vidu la afiŝon faksmile en ĉi "Boletín".



CURSO

del idioma internacional ESPERANTO

Clases: Diarias

Horario: Tandas de mañana, tarde y noche

Local: Grupo de Esperanto "VERDA STELO"
Teléfono 31 56 29

Lugar: Calle Pintor Imeldo Corral, 14, bajos
(frente a las taquillas del Parque Municipal)

CURSO GRATUITO

Bajo los auspicios de la Comisión Municipal
de Cultura del Excmo. Ayuntamiento de
EL FERROL

CALLOSA DE SEGURA

Okaze de pasintaj festotagoj, dum kristnasko kaj jam en la sojlo de nova jaro, ni propagandis kaj sufiĉe aktivis por kaj per Esperanto.

La 29-an de decembro okazis Elementaj Ekzamenoj de Esperanto en la granda salono de la "Colegio Nacional Primo de Rivera", kies direktorino, Prof-ino Carmen Baeza, honore prezidis tiun eventon, El inter 23 gepartoprenantoj -pli ol tri kvaronoj 10-14 jaraj- 18 sukcesis en la elementa diplomo. Pastro Armelles, kiu venis en Callosa de Segura por kunprezidi, restis vere surprizita pro la elmontrita kapableco de la infana gelernantaro. S-roj F. Zaragoza, Vicente Molins kaj Antonio Calvo, kompletigis la prezidantaron.



En la sama tago, kaj tuj post la ekzamenoj, la tuta ĉeestantaro piediris al malproksima strato por oficiale malfermi la Esperantan Ekspozicion. Tial, ke, la ekspoziciejo estis lokigita en grava ĉefstrato kaj anoncita per tre altira afiŝo pendanta meze de la vojo, estis ĉiutage vizitata de granda popolamaso, inter kiuj elstaraj respondeculoj, kiuj vere laŭdis la ekspozicion, pro ĝia abunda materialo kaj elstaraj esperantaj verkoj. La muroj estis ornamitaj per kolektoj da poŝtmarkoj, bildkartoj, broŝuroj, moneroj, afiŝoj, k.t.p.

Dum la 8 tagoj, en kiuj estis malfermita la ekspozicio, 134 vizitantoj profitis la okazon por fari ekzamenitan pruvon pri la facileco kaj taŭgeco de Esperanto. Ili ĉiuj estis invititaj partopreni ĉiun semajnan kurson de Esperanto en Colegio Nacional. Nuntempe la galerantaro preskaŭ duobliĝis.



Nia semado estas abunda, kaj ni esperas fruktodonan rikolton. Ja nuntempe en Callosa de Segura ofte oni parolas pri Esperanto, sed tre atentinde estas, ke granda amaseto da gekursanoj, tra la strato, unuj la aliajn salutas en Esperanto; inter ili, certe, malmultaj, momente, kapablas konversacii kaj babili en Esperanto dum komuna interparolado.

Proksiman majon, la duan dimanĉon, kiel ĉiujare, la gesamideanoj el la provincoj Valencia kaj Alicante renkontiĝos en Benidorm por gaje festi la tradician kunvenon.

Sekretario
J. M. Bernabeu



SABADELL

SOCIETA FESTO 1977. La 19-an de februaro, nia Centro festis sian tradician Societan Feston, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj. La etoso estis agrabla, simpatia. Ĉiu ĉeestanto estis regalata per abunda ĉampano kaj bongusta kukajaĵo.

Kiel kutime, oni aljuĝis diversajn premiojn al la portantoj de la plej belaj karnavalaj kostumoj. Ĉarmaj knabinoj, elegantaj knaboj kaj simpatiaj infanoj, konkuris por atingi sukceson.

Jes, ni ankaŭ elekis nian reĝinon, nian "Pubilla" por 1977, tiel grandan honoron kaj respondecon atingis f-ino Nuria Serrat Garnacho. Gratulojn.

La Festo daŭris ĝis la unuaj horoj de la sekvanta tago, kaj ĉiu ĉeestanto promesis sian partoprenon por la venonta jaro.

Luis-Serrano



VALLADOLID

Raporto pri la aktoj okazitaj en la grupo "Fido kaj Espero" okaze de la semajno pri internacia amikeco.

Kiel kutime, oni okazigis en Valladolid la Semajnon pri Internacia Amikeco, dum pluraj tagoj.

La 22-an de februaro, je la oka vespere, en nia salono, s-ro Castañón, prezidanto de la Grupo, prezentis la prelegonton s-ro Gamboa, vicprezidanto de la Grupo, kiu hispane parolis al la ĉeestantaro pri siaj komencoj en la studado de Esperanto, "La lingvo de ĉiuj" laŭ valladolida poeto Martín Abril, kaj sia propra evoluo ĝis la tutplena integriĝo al la Esperanto movado. Tiu-ĉi interesa parolado estis longe aplaŭdata.

Sekve s-rino M.R.Urueña legis kelkajn interesajn notojn de la E-a revuo "Bulgara Esperantisto" pri la vera senco de la slogano "Amikeco trans limoj", klarigante kelkajn gramatikajn aspektojn de la frazo laŭ diversaj opinioj. Fine, okazis lotumado da esperantlingvaj libroj inter la ĉeestantoj.

La 24-an, jaŭdo, je la 20-a horo, prelegis hispane nia samideano J.M. Piquero Muñiz, pri la historio de la Semajno de Internacia Amikeco. Tre bone dokumentita, li rakontis al ni pri la origino de la Semajno, parolante pri la ideo de s-ro Eric Karlen pri la kreado de tiu festo, kaptante la ideon de la TAGO de la "Skribita letero", kreata de U.P.U. (Universala Poŝta Unuiĝo).

La parolado de s-ro Piquero estis ege interesa, ĉar malkovris al ni diversajn sciigojn kaj faktojn, tute nekonataj de la ĉeestantoj..

Tondra aplaŭdado premiis lian interesan prelegon. Fine, ni gustumis "hispanan vinon" donaco de la Grupo, malavare preparita.

La 27-an, dimance, je la 13-a horo kuncelebris Sanktan Meson en Esperanto Pastroj J. Castro kaj P. de Fuentes; tiu lasta ankaŭ predikis en la internacia lingvo. La Diservo okazis en la Kapelo de la Altkolegio "La Salle". Fine, pluraj gesamideanoj kaj familiajnoj frate kaj amike kunmanĝis en centra Hotelo, tostante je la fino pro la amikeco inter ĉiuj.

Ĉeestantino



ZARAGOZO

"FRATECO". Je la fino de 1976 komenciĝis en nia grupo du kursoj de Esperanto. Unu estis por komencantoj, gvidata de s-ro Salete, kaj la alia por progresantoj, gvidata de s-ro Marco.

Por festi la Zamenhofan Tagon, oni organizis Fratecan Vespermanĝon en tre bela salono de "Casino Mercantil". Ĉeestis pli ol 67 geesperantistoj; ĝoje ni pasigis la feston; plie, membro de "Frateco" verkis dum kelkaj minutoj novan joton por s-ino, kiu partoprenas la komercantan kurson, kaj ŝi kantis bonege la jenan joton, malgraŭ mankis gitaro kaj aliaj muzikiloj:

Mi dediĉas mian kanton
al la tuta ĉeestantaro
gajan nokton mi deziras
ĝis la venonta jaro

DE FERRAZ
JESUS GONZALEZ GARCIA Y EL
ESPERANTO COMO IDIOMA
UNIVERSAL

El doctor Jesús González García, jefe de la sección de Enseñanza de la O.N.C.E., pronunció una conferencia sobre "El esperanto y las otras lenguas".

■ EL PERSONAJE

JESUS GONZALEZ GARCIA Y EL ESPERANTO COMO IDIOMA UNIVERSAL

(ABC)

Con motivo del LX aniversario de la muerte del doctor Luis Lázaro Zamenhof, en la Federación Española de Esperanto, Jesús González García, Jefe de la sección de Enseñanza de la O.N.C.E. pronunció una conferencia sobre "El esperanto y las otras lenguas".

—El esperanto como idioma auxiliar internacional es un instrumento muy eficaz para la comprensión entre los pueblos y

para salvar el problema de las distintas lenguas en el mundo y en Europa. De cara a la unidad europea, por la que tanto se trabaja, es importante contar con una lengua de comunicación a nivel internacional y con esto no es que pretenda que se convierta en la sustituta de las otras, sino en una lengua auxiliar. En esta conferencia también planteo la dificultad del aprendizaje de las distintas





(ABC, 15 de Abril, 1977)



lenguas por los problemas fonéticos, las estructuras gramaticales, la poca precisión, la diferencia entre el lenguaje hablado y el escrito y el resultado tan pobre que se obtiene con esfuerzos importantes.

—¿Cuáles son las características del esperanto?

—Es una lengua clara, bella, de sonido eufónico, fácil en el aprendizaje y que al no pertenecer a ningún grupo o país supera las dificultades y rivalidades entre las distintas naciones. El esperanto es una lengua que con un mínimo de raíces y un sistema de derivación y composición muy variado, una persona puede crear y expresarse con palabras que no conocía. Se han hecho varios intentos por conseguir una lengua universal y ninguno ha tenido éxito; yo no soy un fanático, porque creo que el esperanto es susceptible de perfeccionamiento o se puede crear otro instrumento que le supere, pero hoy por hoy, el esperanto ha logrado una gran difusión, a pesar de que no ha contado con protección oficial.

—¿Cómo ve el futuro del esperanto?

—Ultimamente se ha perdido entusiasmo, pues las guerras mundiales supusieron una paralización de los movimientos esperantistas. El momento actual no es muy propicio; lo interesante será que la Unesco recomendara a los distintos Gobiernos su implantación en la educación.

—¿Dónde radican las dificultades de su aprendizaje?

—Es necesario para aprenderlo un nivel cultural mínimo. Es un idioma con dieciséis únicas reglas, sin excepciones, un lenguaje fonético, con todas las palabras llanas. La pronunciación es muy sencilla; casi todas las letras son como en español y hay tantas letras como fonemas. Una persona preparada con un nivel de Enseñanza General Básica puede aprenderlo en dos meses con una hora diaria de trabajo.

—¿Qué organismos trabajan en la divulgación del esperanto?

—Existe una Asociación Universal, la Universal Esperanto Asocio, que tiene la responsabilidad del movimiento a escala mundial. Esta asociación colabora como órgano consultivo de la Unesco, y, aunque emite sus recomendaciones, no se la hace mucho caso.

—¿El esperanto es un lujo?

—Nosotros decimos, en broma, que el esperanto es el idioma internacional que no habla nadie. Para mi, como ciego, no es un lujo. Existe una Liga Internacional de Ciegos Esperantistas que edita una revista en esperanto a través de la cual nos comunicamos. El esperanto me ha sido de gran utilidad para contactos internacionales, y siempre que he necesitado algo de cualquier país, a través de los esperantistas, se me han facilitado las cosas.

Pilar TRENAS

LAS PALMAS DE GRAN CANARIA

Nova Esperanto-Kurso komenciĝis en la lernejo "Colegio La Salle-Antúnez"—Alcaravanas— Las Palmas de Gran Canaria. Ĝin partoprenas pli ol 30 lernantoj; ĝia gvidanto estas Prof. Antonio Sarmiento. Oni sekvas la didaktikan metodon de la hungara D-ro I. Szerdahelyi. Ĉiuj infanoj havas la libron "Esperanto Internacia 1" kaj la vortaron "Lexicón Sopena"

La kursanoj estas pretaj korespondi kolektive kun gelernantoj de aliaj lernejoj en la tuta mondo. Jen la adreso: Colegio Salle-Antúnez-Kurso de Esperanto— Luis Antúnez, 37 — Las Palmas de Gran Canaria, Hispanio.



Colegio La Salle-
Antúnez.
Esperanto-kurso.

ALICANTE

Karaj samideanoj:

Pasintan 26-an de Februaro okazis, laŭ la planita programo, geesperantista kunveno de la Grupo de Esperanto de Alicante en deca kaj bela salono, sinjoro Zaragoza prezentis la konferencanton, sinjoro Fernando de Diego, kiu venis al nia urbo intence kaj mem-

vole por tio, ĝentileco kiun ni ĉiuj dankis, li temis pri Pollando, pro la diversaj faktoj kiujn li traktis, urboj, kampoj, stratoj, ĝardenoj kaj kutimoj en tiu lando, objektivite, li eltiris gravajn kaj interesajn konkludojn pri la vojaĝo al tiu lando, li tute sukcesis kaj, la geĉeestantoj, ĝuis kaj dankis lian sindonemon.

Sekvis la malfermo de la jara ĝenerala kunveno de la grupo, oni aprobis la pasintjaran laboron; la kasisto informis pri la monstato kiu tute bonfartas kaj poste oni elektis novajn estraranojn.

Aklame nomis honoran prezidanton sinjoro, Juan Asensi Ireni, kaj honoran dumviva membro sinjoro, de Diego. Grava kaj ĝenerala interkonsento estis tiu, organizi renkontiĝon ĉi jare en la urbo Benidorm, ĝustatempe, la propaganda fako de la grupo informos ĉiujn pri la ĉiaspecaj detaloj de tiu estonta renkontiĝo.



Post fino de la kunveno, ĉiuj iris en esperantan restoracion, "Fleta", por noktmanĝi frate, la salono, ornamita per arta pentraĵo de Doktoro Zamenhof, kaj la granda flago de la grupo prezidis la okazintaĵon. Dum la komenco oni muzikis esperantajn kantojn, la babilado estis konstanta, svebis frata amikeco super ĉiuj, la fino kaptis ĉiujn tute ne atentite, post la dissiĝo kaj adiaŭo, ĉiuj sopiris al proksima kunveno por, denove, ĝuitian agrablan kaj esperantan atmosferon.



La 22-an de Majo matene, renkontos ĉiuj en autobusa haltejo ĉe la strato Esperanto (unu el la ĉefaj stratoj en la centro de la urbo) per floroj oni ornamos la stratafiŝon; post tio ĉiuj kunvenos en la salono por okazintaĵoj ĉe



“Caja de Ahorros de Alicante y Murcia” en Benidorm, tie oni povos aŭdi la bonvenon de la reprezentantojn de aliaj regionoj kaj eksterlandaj; la prezidanto de la Grupo de Esperanto de Alicante metos antaŭ la ĉeestantaro la daton kaj urbon por estonta renkontiĝo venontan jaron, post la efekto de ambaŭ, daurigos sekve, oni distribuos la diplomojn inter la gesamideanoj kiuj, feliĉe, trapasis la ekzamenojn sukcese; la geinfanoj el Callosa de Segura rulos teatran verkon per majstraj kaj artaj voĉoj, fine de la spektaklo, ĉiuj iros promeni por ĝui la maran pejzaĝon tra la bela mara promenejo, je la tagmanĝa horo, ĉar la mara aero levigas apetiton, iros akurate en centran restoracion kie, ĉiuj povos ĝui kaj festi la kuneston de konatuloj kaj nekonatuloj, landaj kaj eksterlandaj.

Por informoj kaj detalaj klarigoj demandu rekte al la suba adreso.

La Prezidanto
Miguel Manteca.

Informa Oficejo.
Joaquín López Herrero
Edif. Gafner. 26-10-B – Telf. 264986
Albufereta (Alicante)

LA MADRIDA ESPERANTO LICEO KAJ LA ZAMENHOFA TAGO



Grupo de madridaj esperantistoj kiuj ĉeestis en la tradicia vespermanĝo organizita de la LICEO okaze de la naskiĝa tago de Doktoro Zamenhof.

FEMINISMA RUBRIKO

ONI NE NASKIĜAS VIRINO; ONI FARIĜAS VIRINO

Oni povas diri, ke la virino estas diskriminaciigita ekde la momento de ŝia naskiĝo.

La pupo estas ŝia malgranda amikino; ŝi devas agi kiel la patrino: varti la pupon kvazaŭ ĝi estus fratineto aŭ frato, fari la mastrumadon, iri al la vendejo, pretigi la tablon k. t. p.

Pri la knaboj estas tute malsama situacio; liaj ludoj estas teknikaj: trajnoj, aŭtomobiloj, konstruaĵoj ...ludoj, kiuj donas al la knabo man-lertecon, kaj tio taŭgas por ke la knabo disvolvu sian imagon.

Pri enketo, kiun oni faris al s-ro Francois Giroud, Sekretario pri virinaj kondiĉoj en Francio, li respondis, ke nur en infana lernolibro, la patrino kuiras dum 30 fojoj; ŝajnas kvazaŭ la patrino faras nenion plu en sia vivo ol resti en la kuirejo.

La patro laboras ekster la domo.

Konstatu, ke en Francio, la virino devas havi specialan departementon, kvazaŭ ŝiaj kondiĉoj estu malsamaj al tiuj de la viroj; la departemento traktas ŝiajn problemojn kiel unu punkton plian en kiu ajn tagordo.

Ĉio influas en la vivo de la knabinoj; dum tiu periodo (3-4 jaroj) oni altrudas al ili la ideojn kaj oni ne respektas la estontan personecon. Badaŭrinde, en la edukado de la gefiloj, kaj en la instruado en infanĝardeno, ekzistas ankoraŭ la seksdiskriminacio.

Estas desegnoj, kiuj montras la familion: la patrino kudras, la patro legas la ĵurnalon, la filo ludas per trajnoj, kaj la filino vestas la pupon. Tio estas alia maniero de diskriminacio. Oni ne diras al la infanoj, ke ne estas speciala ludo aŭ speciala laboro por ia sekso, ke ĉiuj kapablas fari la samajn aktivecojn.

Nun oni prezentas statistikon, konsekvence de enketo realigita al la patrinoj de 72 gefiloj, 3-4 jaraj, dum 1974.

Pri 100 infanoj, kiom da ili estas admonataj?	Filinoj	Filoj
pro ne obeado.	95	78
pro kaprico	73	57
pro ne dankado.	40	27
pro rompo de objekto	24	15
pro ĝenado de frato aŭ fratino	33	27
pro ne havi disciplinon en la lernejo	15	39

(Enketo de A. Michel 1974 Usono)

Tio montras, ke en ĉiu situacio estas pli riproĉitaj la knabinoj ol la knaboj, ĉar ŝi estas la virino kaj devas esti pasiva kaj pacema, por fariĝi bona edzino.

Nur en la lasta punkto estas pli riproĉitaj la knaboj, ĉar estas ili, kiuj devas lerni por okupi en la estonteco la plej gravajn postenojn, kaj subteni siajn edzinojn kaj gefilojn.

Silvia Martínez

LIGA INTERNACIONAL DE PROFESORES ESPERANTISTAS (I.L.E.I.)

Queipo de Llano 18 CALLOSA DE SEGURA (Alicante)

*A los miembros españoles de I.L.E.I.
A los Profesores y Maestros de Esperanto*

Muy Sr. nuestro:

Tenemos el gusto de dirigirnos a Vd. para rogarle complete y nos envíe la adjunta ENCUESTA. EL ESPERANTO, es el idioma indoeuropeo más perfecto del mundo y, por ello, merece toda la atención del cuerpo enseñante para que los niños de hoy puedan fácilmente comunicarse mañana, sin las barreras lingüísticas que suponen los idiomas nacionales, regionales o locales.

Muy agradecidos por su colaboración, le saluda cordialmente s.s.s.

F. Zaragoza

Delegado español de I.L.E.I.

Vd. puede ayudarnos en nuestra empresa haciendo copias y distribuyéndolas entre sus amigos y conocidos. Gracias.

ENCUESTA

— Por favor, conteste con brevedad, pero suficientemente.

- ¿ Sabe Vd. qué es el ESPERANTO?
- ¿ Ha oído hablar de él en alguna ocasión?
- ¿ Conoce algún esperantista?
- ¿ Sabe Vd. que se habla en todos los países del mundo?
- ¿ Sabe Vd. que es una lengua lógica y, por ello, fácil?
- ¿ Cree Vd. que se debería enseñar en la 2.^a Etapa de E. G. B.?
- ¿ Sabe Vd. que se enseña ya en más de 25 Establecimientos oficiales?
- ¿ Sabe que, para un buen conocimiento, el francés necesita 2.000 horas de estudio, el inglés, 1.500 y el Esperanto, sólo 150 horas?
- ¿ Sabe Vd. que está reconocido por la ONU y por la UNESCO?
- ¿ Sabe Vd. que en el mundo admiten telegramas en ESPERANTO, pero no en unos quince otros idiomas nacionales?
- ¿ Sabe Vd. que es bello, flexible, fácil y sonoro?
- ¿ Desearía recibir noticias complementarias sobre él?
- ¿ Querría colaborar con nosotros en su difusión ?
- ¿ De qué modo?

I. L. E. I.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ

INSTRUISTOJ

Hispana Sekcio, Queipo de Llano, 18
CALLOSA DE SEGURA (ALICANTE)

Altestimataj kolegoj kaj amikoj : La lernojaro 1975-76 ĵus finiĝis laborplena kaj saturita de promesoj. En siaj tagoj vigliĝas la eldono de la Statuto, la ekzamenoj por la Elementa Diplomo, la eldono de du lernejoj gazetoj, la eldono de poŝtkartoj, la traduko de la Statuto hispanen por la estraro de ILEI, k.c., ĉion danke al la sindono kaj simpatio de niaj amikoj kaj kunlaborantoj.

Fakto por substreki estas la grandigo de nia membraro: de 68 membroj dum la pasinta decembro 75, ni estas nun 123 membroj, kaj ankoraŭ ne estas elĉerpita la nombro da profesoroj-esperantistoj, ekzistantaj en nia lando.

Nia devizo daŭras valida: LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA 2-an FAZON DE LA E.G.B. Kaj pro tio, ni devas kontaktigi ĉiujn profesiulojn de la instruado, esperantistoj, por ebligi la atingon de tiu celo. Italio jam havas sian leĝoproponon. Ni ne ŝparu niajn strebojn.

En la konferenco de I.L.E.I., ĉe San Marino, partoprenis du el niaj membroj-Profesoroj Jesús Pérez kaj Antonio Sarmiento, ambaŭ kiel Delegitoj de nia Sekcio.

Nia sekcio disdonis kaj dissendis: 250 afiŝojn; 1.300 propagandajn poŝtkartojn; 250 enketojn. Nia Biblioteko enhavas 138 verkojn, kaj nia Sekcio eldonas informilojn "5 minutoj de Esperanto" por geinfanoj kaj "Parolu en Esperanto" por gejunuloj; plie 38 gelnantoj partoprenas en nia senpaga kurso de Esperanto per korespondo kaj je la 30-a de decembro ni organizis Ekzamenojn, Ekspozicion kaj Artan Teatron Kulturana Festotagon.

Kotizoj. Nia jara kotizo estas 100 pesetoj.

Internacia pedagogia revuo. Eldonata de Internacia Ligo de Esperanto Instruistoj (ILEI), aperas trifoje jare kaj la jarabono estas 200 pesetoj. Mendu ĝin rekte al la Hispana Delegito de ILEI Prof. F. Zaragoza Ruiz, Queipo de Llano 18, Callosa de Segura (Alicante).

Informado. Radio Elche, Murcia kaj Alicante dissendas niajn sciigojn kaj raportaĵojn; plie, la ĵurnaloj "La Verdad" de Murcia, "El Comercio" de Gijón, "Diario de las Palmas", "La Nueva España" de Asturio kaj "Información" de Alicante, plurfoje en siaj kolumnoj apogis niajn strebojn. Al ĉiuj, niajn elkorajn dankojn!

Prof. F. Zaragoza Ruiz

HISPANA ESPERANTO-JUNULARA SEKCIO

Junulara Sekcio de H.E.F.

Sidejo: Gral Mola, 99 - 1^o Sabadell (Barcelono)

Poŝta adreso: Apartado 407, Sabadell (Barcelono)

Konto n-ro 15049-56 en Banco de Sabadell (ĉefa oficejo)

"...KAJ NOVA ESTRARO", estas la ĉefartikolo de la nova HEJS-estraro, aperita en la HEJS-bulteno n-ro 104. El la diversaj linioj, ni publikigas la jenajn: "Pro tio ni konsideras, ke la nuna estraro devas esti provizora, ĝis kiam la membroj almenaŭ se elekti ni eblas, akceptu aŭ ne ĝin, Niaj postenoj ekde nun, do, estas je dispono de la membraro".



ESTRARO

Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre, Pare Claret, 446, Barcelono-16

Vicprezidantino: Silvia Martínez, Bonavista 163, Sabadell.

Sekretariino: María Jesús Molina, Maladeta, 30, Sabadell

Kasisto: Josep Cara, Gambús, 44-3^o-2^a, Sabadell

REDAKCIA KOMITATO

Ĉefredaktoro: Oscar Puig, Güell i Ferrer, 223, Sabadell

Helpredaktoro kaj grafikisto: Francesc Cara, Gambús, 44-3^o-2^a, Sabadell

Teknika respondeculo: Johano Guillón, Wifredo, 6-3^o-2^a, Barcelono-1

Fakĉefulo pri distraĵoj: Johano Guillón

Fakĉefulo pri tradukaĵoj: Ludoviko de Yzaguirre

DONATIVOS PARA EL BOLETIN

Suma anterior	4.000.-
Giordano Moya	100.-
Africa Retana	100.-
Manuel Cos	50.-
Ana M ^a Molera	100.-
Jaime Molera	100.-
José Lerroux	50.-
Tage A. Pettersson	100.-
Víctor Ortiz Gratal	600.-
Rafael Herrero Arroyo	400.-
Total	5.600.-

DONATIVOS PARA EL F.A.L.P.

(Fondo para la adquisición del local en propiedad)

Suma anterior	585.842.-
Abelardo Benet Pillado	1.000.-
José Arroyo García	600.-
Total	587.442.-

SOCIOS PROTECTORES DE H.E.F. PARA 1977

17—Giordano Moya Escayola	(180)
18—Abelardo Benet Pillado	(2217)
19—Ana M ^a Molera Urgellés	(558)
20—Jaime Molera Urgellés	(734)
21—José Lerroux Torres	(373)
22—Tage A. Pettersson	(2183)
23—Víctor Ortiz Gratal	(619)
24—Domingo Domenech Savall	(1594)

ALVARO DE ORRIOLS MORTIS

Pli ol okdekjaraĝa, Alvaro de Orriols, granda literaturisto kaj elstara poeto en la lingvoj kastilia, kataluna kaj esperanta, mortis en Bayonne (Francio), kie li lógis de post nia civila milito.

Li naskiĝis en Barcelono, kaj, jam de fruaĝo, li sin donis al belartoj: skulptarto, muziko, desegno, sed, ĉefe, allogata de literaturo. Dudekjaraĝa, oni publikigis liajn unuajn literaturaĵojn: mallongajn fabelojn kaj poeziaĵojn, en ĵurnaloj kaj gazetoj en Barcelono.

Kvin jarojn poste, li prezentis en Madrido sian unuan teatraĵon: "La Daga", adaptiĝo al la kastilia versfarado de la fama dramo "Lo Ferrer de Tall" de Seraff Pitarra, la granda kataluna dramisto de la fino de la pasinta jarcento; tri jarojn poste, Henriko Morera, la fama aŭtoro de la sardana "La Santa Espina", lirikigis ĝin.

La fekunda talento de Orriols verkis multe; ni mencias la jenajn titolojn: "Nervio" "El Mastín de la Pedrosa", "Costa Brava" "La Pescadora de Ubiaco", "El Caudillo de Urbión". En postaj jaroj aperis la opereto "La Moza Esquiva", la dramoj "A-thael", "Rosa de Sangre", post kies premiero la ĉeestantaro, entuziasmigita, subportis lin surŝultre ĝis "La Puerta del Sol".

La grandaj sukcesoj de Orriols manifestiĝis ankaŭ en la Argentina Respubliko, ĉar, en grava teatro, oni reprezentis po tri fojojn tage liajn dramojn, kio estis ĝis tiam nekutima oftigo. Ankaŭ la dramo "Máquinas" havis grandan sukceson, preskaŭ ĉe la komenciĝo de la civilmilito.

Post la milito -ekzilita en Francio- li verkis "Romence de Madrid", kiu estis, tiutempe, ege sukcesinta en diversaj landoj ekster Hispanio.

Li alternigis la skulptarton kun la literaturo dum sia deviga restado.

Li ĉefe verkis, tiam, en kataluna lingvo: "Cirano de Bergerac", de Rostand; "Yerma", "La Casa de Bernarda Alba" kaj "Romancero Gitano", de García Lorca; de Rubén Darío "Antologian Poemaron".

Li verkis, ankaŭ originalaĵojn: "La guerra sens homes" kaj "L'hostal del mar".

Sed, ni devas elstarigi, el la pluredra literatura fekundeco de Orriols, ke li estis bonega esperantisto, kiu ne povis manki al pago de tributo al la esperanta poezio, kiu tiel bone ebligas sukcesojn, pro sia eŭfonio kaj alloga ritmo. Efektive: multfoje premiita en literaturaĵ konkursoj, li ankaŭ tradukis la "Ciganan Romancaron" de Federico García Lorca, esperanten, kion li faris ankaŭ en la katalunan, kiel suprecitite.

La diversaspektaj verkoj de Orriols pravas, ke la poezia genio ĉiam trovas aperta la pordon de la Parnaso, en Esperanto, kaj, tiel kiel Schiller kaj Shakespeare estis jam trafe tradukitaj de Zamenhof, la malfacile tradukebla stilo de García Lorca trovis bonan sorton per la fidelaj tradukoj de De Diego, Gusev... kaj de Orriols.

La Parco ĵus tranĉis la fadenon de Orriols, kaj, tial, la kastilia, kataluna kaj esperanta beletroj funebras, ĉar liaj fekundeco kaj elstaraj kvalitoj, estas malofte troveblaj.

Nun, mi deziras konstati, ke la hispana esperantistaro, kaj, ĉefe, la kataluna, agnoskas liajn meritojn, kaj omaĝas al la memoro de tiu dramisto, kiu, pro la bedaŭrindaĵoj de la vivo, spertis, per siaj propraj travivaĵoj, daŭran kaj streĉan tragedion.

Ke li ripozu pace ĉe la Paradizo de la Poesioj!

Cirano

62-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Rejkjaviko (Islando) 1977 07 30-08 06

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, NEDERLANDO

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Pósthólf 1081, Reykjavík.

LA RAJTO JE KOMUNIKADO

En sia januara kunsido en Roterdamo la Estraro de UEA fiksas kiel ĉeftemon de la Kongreso en Rejkjaviko: "La rajto je komunikado". Estas planate inviti al la ĉefa laborsesio ankaŭ specialistojn pri tiu temo el ekster la Esperanto-movado. Kvankam la vorto "komunikado" ne aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, pluraj fundamentaj rajtoj apartenas sub tiu rubriko -ekzemple la rajto je privateco de la korespondado, la rajto manifesti sian religion aŭ kredon, la rajto je libera esprimado kaj la rajto peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere la landlimojn. En ĉio ĉi la lingvo povas roli kiel rimedo por efektivi tiujn rajtojn-aŭ kiel obstrukcilo, se ĝi estas misuzata.

La sama temo estos pritraktita ankaŭ kiel interna temo. Diversaj kunsidoj pritraktos la rajton je komunikado interne de la Esperanto-movado: per korespondado, gazetaro, radio-elsendoj, ktp.

Inter aliaj laborkunsidoj antaŭvidataj estas tiuj pri ekstereŭropa agado ĉe UN, kultura agado, virina agado kaj la diversaj kunsidoj de fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj.

PROTEKTANTO ĈEESTOS PERSONE

La Alta Protektanto de la Kongreso, la islanda ŝtatprezidanto d-ro Kristjan Eldjárn, afable konsentis persone ĉeesti la Solenan Inaŭguron. Li krome akceptos reprezentantojn de la Kongreso en la Prezidenta Rezidejo.

AMPLEKSA BULTENO-PRESPRETA

La nekutime ampleksa -40-paĝa -"Dua Oficiala Bulteno de la UK" estas jam prespreta kaj aperis komence de februaro. Ĝi estas tuj ekspedita al ĉiuj kongresanoj. La Bulteno enhavas i. a. detalojn kaj mendilojn pri hoteloj kaj aliaj loĝejoj, ekskursoj, antaŭkongreso, postkongresaj ekskursoj, bankedo, flugoj al Rejkjaviko, provizora programo kaj multaj aliaj aspektoj de la Kongreso.

DON ANTONIO GRAU FERNANDEZ

MIEMBRO DEL COMITE LOCAL DEL CONGRESO

Por una omisión involuntaria, por la que pedimos disculpas, en el Boletín de enero/febrero no figuró entre los componentes del Loka Kongresa Komitato el nombre de Don Antonio Grau Fernández, quien desde el primer momento forma parte como Vocal de dicho Comité.

Nuevamente rogamos al Sr. Grau sepa disculpar esta omisión.

“LA BRULIGITA URBO”

FILMO DE ANTONIO RIBAS

Suno

Denove nia Internacia Lingvo estis utiligata en filmo; ĝia nomo, “La bruligita urbo”, filmo, kiu estis originale verkita kaj projektita en kataluna lingvo dum la jaro 1976-1977, entenas kelkajn scenojn en Esperanto.

Se en nia antaŭa rubrico ni rememorigis al vi pri malnova filmo “La granda diktatoro”, nun nia ĝojo estas ankoraŭ se estus ebla, pli emocia, kiam ni konstatas, ke Esperanto ne nur en nian ĉiutagan vivon jam penetris, sed ke ankaŭ dum la unuaj jaroj de la 20-a jarcento, -1.909 en Barcelono okazis la 5-a U.K.- la instruado de la “Lingvo de la estonteco” laŭ la eldiroj de la rolantoj, penetris en laboristajn, industriajn kaj kulturajn rondojn.

Danke al la fervora agado de nia samideano Ricart Güell, kiu helpis al la direktoro kaj rolantoj pri la esperantaj konversacioj, la scenoj en kiuj estas instruata kaj uzata Esperanto, ĝi estas tre bone prononcata, kaj la vortoj utiligataj, tre ĝustaj kaj adekvataj. Ankaŭ la sceno, per kiu estas montrata, ke elstara persono preparas salutvortojn en Esperanto por la U.K., evidentiĝas, ke ekde la unua epoko, nia E-movado, almenaŭ en la urbo Barcelono, ne estis afero de iu partio aŭ difinita klaso; kontraŭe, malsimilaj sociaj tavoloj komprenis la taŭgecon kaj utilicon de Esperanto.

“La bruligita urbo” estas filmo, kiu per si mem, staras en speciala podio, unue pro

la tikla temo, due pro la taŭga interpretado de la rolantoj, trie, ĉar oni rakontas kaj vivigas parton de la historio de la urbo Barcelono, kiun ĝis nun neniu faris; tio evidentiĝas, ke nia urbo estas plena da historio kaj kulturo; nur mankas, ke ni montru al la nuna generacio tion, kion niaj praavoj, avoj kaj patroj faris, organizis, konstruis, verkis, sukcesigis kaj malsukcesigis, kaj certe, ni konscios pli bone la nuncon kaj eble pli bone ankaŭ la estontecon de nia E-movado.

Tamen, oni ne atingos tion, se ni ne kreas E-historion de niaj grupoj kaj urboj; pro tio ni deziras fini ĉi komentarion rememorante la artikoleon de nia semideano Llibert Puig en nia HEF-bulteno n-ro 214, titolita “Enlanda Forumo”, kiu en la temo “Lokaj Esperanto-Historioj” plendas pro la grava neceso, kiu ekzistas en nia E-movado, de taŭgaj informoj pri nia E-historio, li diras:

Sendube la ĝisfunda kono de la propra historio stimulos la nuntempajn kaj estontajn aktivulojn al plua evoluo kaj plibonigo. La kompilitan materialon ni povus uzi venonte por publikigo de Hispana Esperanto-Historio.

Ĉu iu E-grupo prenis konsidere tiun proponon? Ĉu E-verkisto komencis verkon pri nia E-historio? Espereble ke jes, sed momente, almenaŭ jam ni posedas unu sonoran atestilon de nia E-historio “La bruligita urbo”.

19-a KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO
en "Cornella", dum la tagoj 17 kaj 18 de septembro

